

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 18/06/2020 Kvarcentokdektria eldono (unua eldono 20/09/2011)



### Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer [rogerspringer@tpg.com.au](mailto:rogerspringer@tpg.com.au);

**Uzindaj ligoj** [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. [rspring@tpg.com.au](mailto:rspring@tpg.com.au)



## Entute **733,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **287,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **234,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **212,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)


Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde julio 2020 ?)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde julio 2020 ?)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Gramatika serio “La Verbo en P.A.G.” N.ro. 125



La Medialo esence signifas “pasive ricevi agon kvazaŭ iu aŭ io faris ĝin aktive sed tiu aganto ne menciatis nek konatas”. Se la kunveno finiĝis, oni ne diras kiu aŭ kio fermis ĝin, sed la pasiva ago de “finiĝi” okazas kvazaŭ oni scius la aganton. Zamenhof kaj P.A.G. ne nur uzas la medialan voĉon ofte malĝuste, nome ke ĝi signifas, ke la pasiva nova subjekto farus la agon sur sin mem kaj per si mem. Ekzemple ke en “La infano vestiĝas rapide” la infano vestas sin mem. Tio malĝustas, ĉar en la mediala voĉo la nova subjekto (la infano) ricevas la agon (vestiĝi) kvazaŭ iu faras la aktivan agon (vesti) de iu kiu ne menciatis nek konatas, do “La infano vestiĝis rapide” signifas ke la infano ricevas la agon vesti kvazaŭ iu alia faras ĝin al la infano. La signifo do estas ke la infano “en la angla\_ “got dressed by somebody not mentioned”, NE “la infano “got dressed (by itself)”, kiel opinias Zamenhof kaj P.A.G. En la mediale riĉa angla lingvo :” povas havi du signifojn, unu la pasivan voĉon kaj unu la medialan voĉon.

**Marcel Leereveld.**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

## Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Roger Springer



## La Manlia Esperanto-Klubo



Sabaton la 20an de junio la Manlia grupo, kunvenos je 10.30 atm ĝis 12tm ĉe la enirejo de Manlia Varfo aŭ ĉe la Bavarian

Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Roger Springer



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

## Variaĵoj en mia ĝardeno.



### POSTKLARIGO.

En n.ro 482 mi penis klarigi, kiel en eŭropaj lingvoj oni malrapide forlasas uzi la formon de la Preterito (= *simple past tense*) kaj anstataŭe ekuzadas por tiu preterita signifo la formon de la Perfekta Tempo. Do “(Mi) *have come home* (hieraŭ vespere je la dekdua)” anstataŭ la antaŭa “(Mi) *came home* (hieraŭ vespere je la dekdua)”. Tio estas la kazo en la neanglaj ĝermanaj lingvoj, kaj jam kompletiginta en la franca. Mian ekzemplon mi do estus devinta preni el tiuj lingvoj (*Je suis revenu(e)*, *Ich bin heimgekommen*), sed por pli klare montri kio okazas, mi uzis la ekzemplon de la angla lingvo. Bedaŭrinde en la angla, kvankam uzata, tiu ŝanĝo ne estas oficiala ĉar la instruistoj instruas ke oni plu devas uzi *I came home*. Anstataŭ pliklarigi, tio eble malklarigis la aferon, se oni en la angla konsideras la Perfektan tempon neleĝa en ĉi tiu kazo. Sed tamen tiu ŝanĝiĝo malrapide okazas, eĉ en la angla. Do prenu la aliajn lingvojn por vidi la ŝanĝiĝadon: *J'ai mangé à 12*, *Ich habe um 12 gegessen*, *Ik heb om 12 gegeten*, *Jeg har spisen klokken 12*. Uzi Esperanton ne utilas por tiu klarigo, ĉar ĝi tute ne ŝanĝas la formon de sia Preterito (Mi manĝis).

Marcel Leereveld.

### AL FRANCISKA.

Nur se oni daŭre klarigas, ke la aŭstralia leĝero ke la ĉefministro rajtas komenci militon, aŭ ke la tero estas ronda, aŭ ke la aŭstralaj (aŭstraliaj indiĝenoj) mistraktatas de la polico, oni fine komprenas kaj agas.

Cetere svedaj sciencistoj antaŭ multaj jaroj testis kaj trovis, ke varmeco mortigas spermatozojn en niaj testikoj (alia genia invento de mia, kaj cia, Dioj). Ĉar mi ne deziras havi pli da gefiloj krom la jamajn du, mi la lastajn kvindek jarojn surportas pantalonon, kaj subpantalonon en la vintro (sed nun ne plu ĉar la vintroj nun estas malpli malvarmaj).

Marcel.

### LA RIĈA ESPERANTO.

Ĉi supre vi legis la vorton “Postklarigo”, kiu signifas klarigo post io alia, ne menciita sed ĝenerale subkomprenata.

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

Zamenhof genie transprenis el la ĝermanaj lingvoj, inkluzive de la angla, la t.n. aglutina sistemo por krei novajn vortojn per la kombino de du (aŭ pli da) ekzistantaj radikoj, kaj li tre pli grandigis la sistemon. Ekzistas ja diversaj specoj de vortfarado en tiu sistemo, almenaŭ en Esperanto, sed la origina kaj plej multe uzata en Esperanto kiel en la ĝermanaj lingvoj, estas la ŝanĝo de normala prepozitivo, kiel ekzemple “mastro de domo” al “dommastro”. En tiu procedo oni kungluas la du (precipe) substantivojn (domo kaj mastro, ĉefelemento kaj flankelemento) renverse (plej ofte) ne uzante la interan prepozicion. La ĝermanaj lingvoj faras la samon, kaj ili havas nur du aŭ tri aliajn, pliajn, specojn de kunmetado, dum Esperanto havas plurajn pliajn, kvankam multe malpli uzatajn.

Jen kelkaj ekzemploj de la plej multe uzata speco, nome ŝanĝo de prepozitivo al kunmetaĵo: Kun du substantivoj: “dommastro; tablotuko (el tuko por tablo); ĝardenforko; kuirejtablo; akvoplanto (por planto en la akvo); lunmonto (por monto sur la luno); tagmanĝo. Kun verbo kiel flankelemento: trinkmono (el mono por trinki); revenbileto; dormĉambro; manĝtempo; danchalo. Ankaŭ kelkaj sufiksoj povas uzati: klubano; virino; skulptilo; iloejo; hejmvenanto; forlasito; kantado.

Alia speco estas kombini la ĉefelementon (*thought*) kun ne la flankelemento (ekz. “decido”) sed kun la intera prepozicio (“post”; el “penso post la decido”) kun la rezulto “postpenso (*afterthought*). En tiaj kombinoj estas ofte malfacila scii, aŭ diveni, kiu estas la forlasita flankelemento. Estas pli facila, sed ne ĉiam certa, diveni kiu estas la forlasita prepozicio. Do en Esperanto “postpenso” = penso post io nemenciata sed sciata. Fakte la prepozicio fariĝis la flankelemento, se oni volas. Sekve la ĉi supra “postklarigo”, la klarigo post io sciata sed ne menciata. Jen kelkaj aliaj ekzemploj de ĉi tiu speco de kombinado, uzata ankaŭ en la ĝermanaj lingvoj: la antaŭĝojo, la kromdomo, la suboficiro, la krommono, la superhomo, la kunulo. Pluraj tiaj kombinaĵoj kun substantiva ĉefelemento venas el verbo en la kombino de verbo kun sia prepozicio (anstataŭ kun sia flankelemento): kuntrinki (= trinki kun iuj), kaj “kunveni” (= veni kun aliaj).

Marcel Leereveld.



## Altaj impostoj

Kara Roger,



Amuzas min legi vian plendon pri la altaj impostoj en via lando. Mi ne scias, kiom alta estas la procentaĵo, kiun ordinara civitano en Aŭstralio devas pagi. Sed mi scias, ke mi ne konas landon, kie oni ne plendas pro tro altaj impostoj.

Kaj en Grandbritujo kaj en Germanujo kaj en Danlando mi legis la aserton, ke ĝuste tiu ŝtato havas la plej altan impostŝarĝon.

Ŝajnas al mi, ke en la nordokcidentaj eŭropaj ŝtatoj ĉie la ĝenerala civitano pagas proksimume 50% aŭ iom pli de siaj malnetaj enspezoj al "la sistemo" (Mi uzas tiun esprimon, ĉar la sistemoj de impostpostulado kaj socia sekurigo iom varias de lando al lando.)

Sed laŭ mia opinio, la demando, kiom alta la procentaĵo estas, ne estas tiom grava. Multe pli gravas, kiom de tiu mono la civitanoj ricevas. Kaj tie mi vidas, ke en la menciata regiono aperas neniam asertoj pri korupteco en la sistemo. (Unuopaj kazoj estas punitaj.) Per aliaj vortoj, la civitanoj ricevas sian monon en iu maniero. Ĉu per senpagaj lernejoj, bona

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

vojsistemo, bona sanservo, helpo en kazo de senlaboreco. Ekzemple mi ĵus ricevis artefaritan kokson. Mi estis en malsanulejo du tagojn, nun la komunumo ofertas trejnadon. Kiom tio kostas min? Eĉ ne unu centon. Bone, pli precize la demando devus esti, kiom kromkostis. Ĉar iusence mi ja dum jaroj per la sistemo pagis por tiu bona prizorgado.

Mi ĝojas vivi en lando, kie malsanuloj ne estas elĵetitaj el la sanasekuro, ĉar nun ili sufiĉe kostis, kie handikapitaj militveteranoj ne devas almozpeti en la strato, kie aliro al alta eduko ne dependas de la riĉeco de la gepatroj.

Mi ĝojas ne vivi en lando, kie la ebloj estas senlimaj. Tie kelkaj, malmultaj havas grandiozajn sukcesojn. Sed por la grandega plimulto tio ankaŭ signifas, ke en kazo de malsukceso la ebloj malbonfarti estas senlimaj. Laŭ mia opinio ne tre homama maniero organizi la kunvivadon.

Mia konkludo: Mi estas kontenta pri la impostŝarĝo, ĉar mi vidas, ke mi kaj la aliaj civitanoj rericevas la monon en iu formo.

Amike, **Peter Weide**



## Estrarkunveno 2020-05-28



### (1) ESPERANTO VIRTUALA TAGO – DIMANĈO, la 7-a de junio 2020

Ni taksis la eventon sufiĉe sukcesa. 150 homoj partoprenis kaj ni ricevis multajn pozitivajn komentojn. Bv rigardi la filmon de la ok prezentadoj ĉe nia retejo.

### (2) REGULAJ MONATAJ ZOOM PREZENTADOJ

Ni decidis starigi monatajn Zoom kunvenojn ĉiun trian dimanĉon inter la 16:00 kaj 18:00 (Melburna tempo)

Ni havu du prezentantojn, unu eksterlandano kaj unu el Aŭstralio aŭ Novzelando.

Jen la tagoj 19/7; 16/8; 20/9; 18/10; 15/11; 20/12

Se vi ŝatus ion prezenti, bv kontakti nin

### (3) KIU ESTAS KIU?

La libro de Katja kaj Charles “Kiu estas Kiu” bone progresas. Katja ŝatus lanĉi ĝin venontjare. AEA pagos la produktadkostojn. Dum la venonta kunveno ni decidus pri la plej taŭga(j) formato(j)

Katja ankaŭ proponis havi specialan jaran memortagon en oktobro por memorfesti nian unuan Esperanto kongreson en 1911.

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**

La listo de nunaj Esperanto virtualaj kunvenoj en Aŭstralio.

**Brisbano:** Ĉiun duan sabaton, je la 14:00-a (kontakto: [maquinacionescreativas@gmail.com](mailto:maquinacionescreativas@gmail.com))

**Sidnejo:** Sabate, 18:00 -20:00

**Melburno:** Dimanĉe, 19:00 – 19:40 (MeetUp)

**Adelajdo:** Dimanĉe, je 14:00 (Meet Up), (14:30 en Sidnejo, Melburno)

Ĉiun unuan merkredon de la monato, je la 19:00-a (19:30 Sidnejo)

Bv partopreni kaj kontribui.

Se vi scias aŭ eble eĉ mem organizas virtualajn kunvenojn informu nin.

Venonta kunveno: jaŭdo 25-a de junio 2020.

**Sandor Horvath**



## Lerni per Duolingo

Kiam mi legis pri la sperto de Trevor Steele rilate lernadon de la hungara lingvo pere de Duolingo, mi rekonis kelkajn trajtojn de la Duolingo-metodo. Sed pro tio ke ĉiu lingvo estas kvazaŭ aparta mondo, mi lernis ankaŭ alian filozofion en frazoj kiel:

Avinjo estas promociita inĝeniero de la reĝino

Mia bovino ne povas esti serioza

La araneo flugas

La procedo por skribi tiun libron damaĝas miajn okulojn

Nia kukurbo estis portita al la banko.

Mi lernis ankaŭ anglajn vortojn ekzemple:” *Conversely*”, mi ne ŝatas tiun urbon.

Tamen tio, kio plej ĝojigas min estas la interveno de verda estulo, kiu movas la kapon kaj la brakojn, por kuraĝi min:

- Ne rezignu, li diras, aŭ erari estas tamen lerni.

La plej kontentoplena instigo estas la ruĝa vorto, skribita per literoj tiom grandaj kiom la ekrano:

**Perfekta.**

Mi ŝatus foti ĝin, sed ĝi malaperas tiom subite, kiom ĝi envenis.

Elektu iun ajn lingvon, provu la metodon de Duolingo, mi promesas ke vi ne enuos.

**Franciska Toubale**



## 3ZZZ

La elsendo de la 15a de junio 2020 proponas informojn pri “memstara zono” en

Seattle kaj analizon de la trajtoj de homoj naskiĝintaj sub la zodiaka signo “ĝemeloj”

**Franciska Toubale**



**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**



# ESPERANTO-TAGO



26.07.2020



Lernu **Esperanton**, la mondan lingvon  
por kunlaborado kaj paco



[www.lernu.net](http://www.lernu.net) • [www.esperanto.net](http://www.esperanto.net) • [www.uea.org](http://www.uea.org)

## Ŝercoj en Esperanto

<https://www.facebook.com/group/s/1048962502110133/permalink/1186098825063166/?sfnsn=mo>

informis **Petro Danzer**

## Internacia Lingvo Stefano

added a new photo to  
the album

### Esperanto-Tago 2020.

10 June at 04:14 · 🌐

...

26-a de julio - Esperanto-Tago, tago de lingva justeco.

Post la viruso la mondo bezonas pacon, respekton kaj kunlaboron, ne militon kaj perforton!

Lernu Esperanton, la mondan lingvon por kunlaborado kaj paco!

- esperanta | eo | Esperanto  
(La Internacia Lingvo) -

**Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE**